

# KOMENCANTO

---

*revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



Dalmatova Daŝa [Jelec, Rusio]

---

2004

Kiel Vladimir V. Samodaj, honora membro de UEA, iĝis esperantisto  
verkoj de niaj legantoj - interese pri la hajko — gramatiko amuze kaj  
serioze — diversaj ondoj de bunta mondo — neelpensitaj historioj  
anekdotoj — ripozejo — la praktiko — korespondu!

5

## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

**Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

**Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

**Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

**Britio** Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

**Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorůka 1, CZ-696 62 Strůžnice

**Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O.Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

**Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

**Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

**Finnlando** Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

**Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

**Germanio** Dr. Wolfgang Sehwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

**Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

**Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

**Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

**Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Branković

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

**Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

**Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

**Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

**Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

**Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

**Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

**Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

**Portugallio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

**Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckeavagen 29, SE — 24294 Horby

**Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

**Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

## Redakcie

Karaj legantoj!

Preparante tiun ĉi numeron ni havis kelkajn kaŭzojn por ĝoji.

Unue pro tio, ke vi sendis al ni intersajn diverstemajn materialojn, kio ebligis fari la revuon varia. Due: - nin ĝojigis via emo provi siajn kapablojn en diversaj ĝenroj de verkado. Ni trovas, ke tiu ĉi numero dank'al niaj komunaj penoj rezultigis divers-aŭtora, diverstema kaj enhavriĉa, kaj esperas ke ĉiu povos trovi ion interesan por si en ĝi.

Sur la paĝoj de la rubriko "Kiel tio komenciĝis?" vi povas konatiĝi kun elstara esperantisto kaj tre interesa persono *Vladimir V. Samodaj*, kies vivo impresas per neordinaraj eventoj. Li estas esperantisto dum 46 jaroj kaj dum tiu ĉi longa periodo sindoneme servas al nia Esperanto-movado. En UK-89 en Pekino prezidanto de UEA Renato Corsetti anoncis nomojn de novaj Honoraj membroj. Tute merite inter ili estis nomita *Vladimir V. Samodaj*.

En la "Verkoj de niaj legantoj" vin atendas debuto de nia nova aŭtoro el Usono *Donald Jacob Uirvlugt*, kiu proponis sian verkon en tute nova por nia revuo ĝenro de esejo, en kiu la aŭtoro prezentas kaj analizas la hajkon kiel poemformon. Ni esperas, ke al vi plaĉos la hajkoj, kiujn verkis mem *Donald Jacob Uirvlugt* kaj jam konata al vi nia aŭtoro el Francio *Yves Brusq*.

Esperable, ke vin interesos ankaŭ la gramatikaj paĝoj, kie ĉi-foje nekutime interplektiĝas gramatiko kaj poezio.

Vere bunte aspektas enhavo de la paĝoj "Diversaj ondoj de bunta mondo", kie vi trovos rakonton de *Hollikberdi Kozimov*, nia debutanto el Uzbekio, pri lia unua vojaĝo al Japanio kaj popular-sciencan artikolon kun praktikaj konsiloj "Sane tra aŭtuno kaj vintro", kiun proponis por publikado jam konata al vi *Dorothea Kaiser* el Germanio.

En la rubriko "Necpensitaj historioj" ni prezentas al vi amazan rakonton de *Bill Thorne*, kiu kutime en multaj siaj verkoj priskribis biografiajn momentojn el lia propra vivo.

Por "Ripozejo" novan gajan ludon proponis nia konstanta legantino *Ginette Martin* el Francio. Ni trovis ĝin tre amuza kaj rekomendas al vi praktiki la ludon dum E-renkontiĝoj.

En "La praktiko" ni prezentas al vi BEMI-organizaĵon, kiu aktive praktikas nian lingvon en la biciklista tereno. Tiun ĉi materialon poe­tike ornamas kongrua al la temo versaĵo "Du starantaj bicikloj" de kunaŭtoroj *Cezar & Donjo*.

Karaj legantoj, ne nur legu, sed kuraĝe provu verki kaj sendu viajn provojn al nia revuo, kaj ne forgesu reaboni "Komencanto"-n por 2005!

## KOMENCANTO

2004 numero 5 // (49) // 6 numeroj jare

regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavceva

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2005:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$12;

konto ĉe UEA: **vkud-a**

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:


Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. яц. 132.

## Kiel tio komenciĝis

Vladimir V. Samodaj

*Vladimir Vladimiroviĉ Samodaj — honora membro de UEA; elstara Sovetia kaj Rusia esperantisto, unu el fondintoj de Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM), estro de sovetia sekcio de Internacia Komitato de MEM (Mondpaca Esperantista Movado), E-ĵurnalisto, eldonisto, redaktoro de la revuo "Scienco kaj kulturo"*



**O**kazis tio en 1958 en urbo Odeso, surborde de Nigra maro, kie mi – preskaŭ 23-jara – laboris kiel takelisto (fakte – specialisto pri transportado de diversgrandaj pezaj kaj mekanismoj en komplikaj kondiĉoj) en ŝipripara uzino. Mi ekvidis en librovendejo modestan anoncon sur griza papereto de la kajera formato – pri tio, ke en la Odesa Domo de sciencistoj funkcias kurso pri internacia lingvo. Ĉar mi interesiĝis pri fremdaj lingvoj, tiu anonco scivoligis min. Mi venis en tiun kursejon, kiam pasis jam du monatoj de la 4-monata studprogramo. Al la fino – post du monatoj – mi jam ĉiujn superis, kaj la kursgvidanto Aleksej Iliĉ Verŝinin, estinta en la jaroj 1930-aj membro de CK SEU (Centra Komitato de Sovetrespublikara E-Unio, kiun la sovetia reĝimo en la jaroj 1937-38 likvidis, multajn ties aktivulojn mortpafis kaj porlonge prizonigis), faris min sia helpanto – “sciencsa sekretario” de E-sekcio. Mi certe ne povis tiam supozi, ke post tri jardekoj partoprenos restarigon de SEU, kaj oni elektos min ĝia prezidanto.

Baldaŭ en la E-sekcio ekstudis Anatolo Gonĉarov, vizitis ĝin foje ankaŭ Boris Kolker (nuna membro de E-Akademio), kun kiuj ni poste dum jardekoj aktivis en la sovetia E-movado.

En 1960 – jam 25-jara – mi studentigis en Moskva Ŝtata Universitato (MŜU), eklemis tie araban lingvon. Estante studento, instruis E-on, iniciatis en 1966 esperantigon de la spektaklo “Cimo” (la aŭtoro – elstara sovetia poeto Vladimir Majakovskij), kiu estis prezentita dum la 22-a IJK en Hungario kaj sekvajare en 4 polaj urboj. En la

## ... ŝajne - mi naskiĝis por esti esperantisto

teatra trupo mi estis sola esperantisto. Tiu spektaklo donis eblecon krei en MŜU E-klubon, kies prezidanto oni elektis min.

En 1965 Anatolo Gonĉarov komencis preparlaboron por krei tutlandan junularan organizaĵon. Lian ideon subtenis kelkaj aktivuloj. En 1966 la ideo estis efektivigita per fondo de neleĝa organizaĵo SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado – tiun nomon proponis mi), kaj ĝia unua senprezidanta gvidantaro konsistis el tri personoj: A.Gonĉarov, B.Kolker kaj mi. Poste Gonĉarov kaj Kolker po kelkaj jaroj prezidis SEJM-on, kiu brile funkciis dum 13 jaroj kaj kiun likvidis mem esperantistoj lige kun la fondo de ASE (Asocio de sovetiaj esperantistoj).

Samtempe mi aktivege helpadis al Konstantin Miĥajloviĉ Gusev, elstara sovetia E-poeto kaj tradukisto, eldonadi E-broŝurojn politikajn kaj literaturajn enkadre de Komisiono por internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj (E-komisiono) ĉe SSOD (Unio de sovetiaj amikec-asocioj kun eksterlando). Mi tiom multan tempon dediĉadis al tiu laboro, ke pro tio eĉ finis la universitaton kun dujara prokrasto.

En 1968-70 mi laboris en Alĝerio kaj Jemeno kiel interpretisto arablingva. Kiam mi revenis en 1970 Moskvon, la prezidanto de E-komisiono prof. Eŭgenij Aleksejeviĉ Bokarjov, elstara lingvisto kaj E-akademiano, proponis al mi gvidi la eldonlaboron de EK kaj nomumis min ĝia vicprezidanto.

Tiupostene mi laboris ĝis la jaro 1979, ĝis la oficiala fondo de ASE surbaze de EK. En ASE mi funkciis kiel vicprezidanto ĝis ĝia likvido en 1989.

En 1971 mi eklaboris en la redakcio de la ĉiusemajna ĵurnalo “Moskvaj novaĵoj”, en la arablingva fako. Post kelkaj jaroj mi sukcesis organizi E-suplementojn al la angla versio de tiu ĵurnalo. Entute estis eldonitaj 12 numeroj de la suplemento (po 16 paĝoj de la formato A4) kun la eldonkvanto inter 5 kaj 10 mil ekzempleroj. Samtempe mi aktivis por fondi sovetian E-revuon, kaj ĉio estis oficiale preta por ĝia aperado, tamen subitaj ŝanĝoj en la statuso de la redakcio “Moskvaj novaĵoj” nuligis miajn kelkjarajn klopodojn. En tiuj tempoj nialande sen oficiala permeso kaj kontrolo de cen-zuro ne estis eble publikigi eĉ vizitkarton.

En la jaroj 1983-86 mi laboris en la eldonejo “Raduga” (“Ĉielarko”), kiu eldonadis librojn en 49 lingvoj. Mi provis organizi eldonadon en la 50-a lingvo – Esperanto, tamen denove malsukcese, ĉar la ĉefuloj estis kontraŭ tiu strangajo.

La funkciado de ASE ne kontentigis esperantistojn, ĉar tie regis patronoj-neesperantistoj. Dum la vica konferenco en januaro 1989 la sovetiaj esperantistoj ekribelis, restarigis la likviditan en 1937 SEU kaj elektis min ĝia prezidanto. Inter la 6 vicprezidantoj estis elektitaj 4 eksaj prezidantoj de SEJM – Anatolo Gonĉarov, Boriso Kolker, Viktoro Aroloviĉ kaj Aleksandro Melnikov.

Tiamaniere ni venkis la krudan patronadon de la oficialaj organoj. Tiam la ago jam estis ebla, ĉar komenciĝis "perestrojko" (rekonstruo) de la lando. Samjare, denove laborante en "Moskvaj novaĵoj", mi sukcesis eldoni provnumeron de tiu ĵurnalo en E-o. Estis ricevitaj pli ol 1000 reeĥoj el 37 landoj, tamen pro miskomprenoj de potenculoj la iniciato malsukcesis.

En 1989 SEU aliĝis al UEA.

Iom malpli ol post du jaroj (fine de la jaro 1990) pro netolerebla kombinita superstreĉo ofica-familia-esperanta mi rifuzis rebalotiĝi por la prezidanta posteno de SEU.

Tamen mia E-agado ne haltis. Aprile 1990, denove laŭ interkonsento inter Gonĉarov kaj mi, estis kreita Moskva literatura E-klubo. Ekde la unua ĝia kunsido mi komencis eldonadi surbaze de ties materialoj negrandan organon de la klubo – 20-paĝan almanakon "Ĉerbe kaj Kore". Kun paŭzoj, kiujn influis seriozaj problemoj en mia persona vivo, mi faris 50 numerojn – sume 1000 paĝoj. En ĝi aperis la unuaj verkoj de pluraj nun internacie konataj rusiaj E-verkistoj. En 1997 mi ĉesigis tiun laboron.

En 1995 la rektoro de Eŭropa Jura Universitato Justo Gennadij Ŝilo proponis al mi redakti en E-o revueton "Scienco kaj Kulturo" (la nomon proponis mi). Mi redaktas-kompilas ĝin ĝis nun, jam la dekan jaron. Jam aperis 54 numeroj, entute pli ol 2800 paĝoj. La enhavo konsistas el sciencaj artikoloj ĉiu-temaj, rememoroj de esperantistoj kaj speciala ĉiunumera 20-paĝa "Literatura kajero" kun originale verkitaj en E-o kaj tradukitaj al E-o beletraĵoj – poeziaj kaj prozaj. En la literaturaj kajeroj sub speciala rubriko "Solistas..." aperis verkoj de nialandaj E-poetoj Mikaelo Giŝpling (nun en Israelo), Mikaelo Bronŝtejn, Klara Ilutoviĉ, Ivan Naumov, Mikaelo Povorin, Valentin Melnikov. Malgraŭ ke mi ne ŝatas publikigi miajn proprajn verkojn, ĉar ne konsideras min poeto kaj ne amikas kun poezio, aperis ankaŭ kajero "Solistas Vladimir Samodaj" – lige kun la 40-jariĝo de mia E-agado. En mia vivo estis periodoj, kiam mi sufiĉe aktive versumis kaj entute verkis ĉirkaŭ 80 aŭ 90 versaĵoj, sen kalkuli poeziajn tradukojn. Laŭ la peto de la geredaktoroj de "Komencanto" mi prezentas kelkajn el miaj versaĵoj.

Krome min tre interesas foto-arto. En kelkaj E-tendaroj rusiaj mi montris ekspoziciojn el miaj fotoj pri la vivo esperantista, pejzaĝojn kaj bildojn, fotitajn dum mia kelkjara laboro en arabaj landoj.

Unu el miaj lastjaraj okupoj – senmedikamenta bioenergia sanigado de homoj...

Ĉar mi estas esperantisto jam dum 46 jaroj, mi kredas, ke neniam kabeiĝos, ĉar – ŝajne – mi naskiĝis por esti esperantisto.

*Karaj legantoj! Espereble publikigitaj ĉi-sube kelkaj poetikaj verkoj de V.V. Samodaj povas prezenti al vi almenaŭ unu faceton de tiu ĉi multifaceta kreiva persono. Eble vi eĉ havos malsaman opinion pri lia poezia talento, ol havas la aŭtoro mem, kiu ne konsideras sin poeto, "sed nur simplajn vortojn notas, kiujn diktas la anim'."*

## P O E Z I O

Kio estas poezio?

Mi ne scias, kredu min.

Ĉu ĝi estas fantazio

Aŭ enigmo sen difin'?

Ĉu kaŝludo intelekta,

Senelira labirint'?

Aŭ ĉu, eble, pado rekta

Al plej alta arta pint'?

Ĉu ĝi estas klara penso

Atingebla por kompren'

De la hom' kun simpla menso,

Nekapabla por diven'?

Ĉu ĝi estas art' superba

Ŝirmi sencon de la vort',

Por poeta histo cerba

Estas nura lingva sport'?

Ĉu ĝi estas elokvento

De l' racia harmoni',

Aŭ kriado kontraŭ vento

Pro kaprico de l' mani'?

Estas multaj opinioj,

Tamen mankas determin',

Do stultuloj kaj genioj

Ĝin diskutas kun obstin'.

Mi ne scias. Mi ne volas

Min turmenti pri la tem'.

Mi modeste tute rolas

En la solvo de l' problem'.

Miaj versoj ne hipnotas

Per bombaste pompa rim'.

Mi nur simplajn vortojn notas,

Kiujn diktas la anim'.

## BETULOJ

Sur altaĵ, en stepo vasta  
du betuloj staras.  
Evidente la betuloj  
tutan vivon paras.

Same altaj, same sveltaj,  
same blank-figuraj,  
staras kune du amikoj –  
arboj bel-staturaj.


Branĉojn-brakojn  
plenkonfide  
interplektis frate  
kaj murmuris, kaj susuras  
ame kaj amate.

Ilin same kun kareso  
flegas varma suno.  
Ilin ambaŭ krude skuas  
frido de l' aŭtuno.

Ilin pare ĝis la tero  
klinas ĉiuj ventoj.  
Ilin kune hard-elprovas  
ĉiuj viv-eventoj.

Tamen kial unu arbo  
estas verd-folia,  
sed kun ora foliaro  
flavas la alia?

/1974/



pentris sur la paĝo Kononova Snjeĵana [N. Omka, Rusio]

Kononova



## FABELO

Nokto ĉe la maro  
Sorĉa kaj fabela.  
Vagas mi en paro  
Kun knabino bela.

Kise ni petolas, –  
Kontraŭ mia brusto  
Tiel dolĉe molas  
La knabina busto!

Steloj palpebrumas  
Kun envia miro,  
Vento nin parfumas  
Per karesa spiro.

Kontraŭ sabla bordo  
Lante ondoj plaŭdas,  
Kvazaŭ en konkordo  
Laŭdas kaj aplaŭdas.

/1974/

## MI VIDIS VIN

Mi vidis Vin – kaj nun jam eblas morti...  
Ĉu iu iam povos Vin superi!?  
Do plu ne indas vivi kaj suferi –  
Mi vidis Vin – kaj nun jam eblas morti!

Mi aŭdis Vin! Nenie kaj neniam  
Ekzisti povas tia bela voĉo!  
Al la destin' mi diras kun riproĉo:  
Ho kial ĝi ne donis ĝuon tian

Al mi pli frue, dum la junco fora –  
Vin vidi, aŭdi, manon Vian kisi,  
Ĉiame kuni kaj neniam disi  
De Via bel' mirakla kaj bonkora!

Mi vidis Vin! Do mi ne povas plendi  
Pri mia sort'. Sed Via bel' fabela  
La vivon faris vana kaj sencela...  
Mi vidis Vin! Do kion plu atendi?

Por vidi Vin valoris vivi...


/1990/

*Ni volonte proponas al vi konatiĝi kun la originala verko de nia nova aŭtoro Donald Jacob Uitvlugt. Valoras, ke la verko prezentas ankaŭ novan por nia revuo literaturan ĝenron de eseo.*

**Donald Jacob Uitvlugt**  
[South Bend, Usono]

## Kiel legi hajkon

*Eseo*



La hajko kiel poemoformo jam ne estas nur japana sed ja internacia afero.

Oni povas trovi hajkojn verkitajn en preskaŭ ĉiu lingvo de la mondo — ankaŭ en nia Esperanto. Tamen krom tiu atesto pri la eblecoj de la mallongega formo, multaj ankoraŭ ne komprenas kio estas la hajko aŭ kiel oni legu ĝin. En Usono tio rezultas parte pro ia perceptita "infaneco" de la formo. Estas nemalkutime por instruistoj taski lernantojn verki hajkojn kiel hejmtaskon. Do multaj en mia lando rigardas la hajkon kiel lernejan aferon kaj nenion plu.

Iasence la hajko ja estas infaneca, sed ne tial, ke ĝi estas simpla aŭ infanbabilaja. La hajko estas infaneca ĉar ĝia eco devenas el infan-simila percepto de la vivo. Legante bonan hajkon, oni spertas tian infanecan miron kiu diras: "Aha! Jes,

tia ja estas la mondo." Pro ĉi tiu kialo, la hajko eble estas la plej demokrata poemoformo. La hajko ne estas posedaĵo de kleruloj aŭ spertuloj — ĝi estas por ĉiuj kiuj povas legi ĝin kun infansimila koro.

Kiel do oni legu hajkon? Unue ni devas kompreni, kio estas hajko. Preskaŭ ĉiu scias, ke la hajko estas japandevna poemoformo el tri versoj de 5, 7 kaj 5 silaboj. Laŭ la propono de "Parnasa gvidlibro", oni rimligas la unuan kaj trian versojn. Miyamoto Masao kaj la aliaj poetoj de la t.n. "Hajkista Klubo" verkis multajn bonajn hajkojn en ĉi tiu rimita formo. Sed la japana hajko ne rimigas, do kompreneble ne necesas, ke la esperanta hajko estu rimata. En la hajko temas kutime pri sperto de la natura mondo. Aŭ pli precize pri la interrilato de la homo kun la natura mondo. Sed la povo de la hajko kuŝas en la fakto, ke ĝi ne nur prezentas la sperton de la verkanto, sed ankaŭ invitas leganton kunsperti tiun sperton. La hajko estas konversacio, en kiu la verkanto konigas sian "Aha-sperton" al la leganto. Tradicie oni faras tion per du apartaj rimedoj: per la "sezonovorto" kaj per la "tranĉ-" aŭ "cezurvorto".

La "sezonovorto" donas al la hajko "kiamon". La hajka sperto ne estas abstrakta sed konkreta. Oni spertas realan aferon en ĝiaj propraj tempo kaj loko. En la japana poezio, la "sezonovorto" ne devas esti nur la nomo de la sezono, sed ankaŭ povas esti ferio, kiu okazas dum tiu sezono, aŭ veteraĵo, aŭ eĉ planto, aŭ animalo kiu aludas la sezonon. Tiu "aludo" gravas. Oni memoru, ke hajko prezentas ne ideon, sed sperton. La japanaj hajkistoj foje uzas la vorton "aromo" por priskribi trajton de bona hajko. Kiel aromo ofte vekas asociojn pri malsanulejo, pri printempaj floroj, pri la panjo bakanta panon, ktp., tiel do la "sezonovorto" helpas percepti la esencon de hajko.

La dua rimedo, kiun oni uzas en la japana hajko, estas la "cezurvorto". Ĉi tio estas japana partikulo, kiu tranĉas la hajkon en du

partojn. En Esperanto oni ofte (sed ne ĉiam) uzas interpunkcion anstataŭ "cezurvorto". Inter la du partoj de la hajko oni trovas "resonancon". Tiuj ĉi du partoj influas unu la alian, kiel *agordila forko* povas kaŭzi samtonan rezonadon al alia ne zumanta forko. La du aferoj elvokas la hajkan sperton en la koro de leganto.

Ni provu nun legi hajkon. Jen hajko de la plej grava majstro de la formo, Macuo Baŝoo (1644-1694). Mi citas la tradukon de Miyamoto Masao el "Hajka antologio" p. 27:

*Cikado trilas*

*nun rokon penetrante --  
natur' trankvilas.*

En ĉi tiu hajko "cikado" estas la "sezonovorto". Kiam oni pensas pri tiu insekto, oni pensas pri la varmaj someraj monatoj. La aŭtoro eble staras en soleca loko, estas nur roko kaj cikado kaj li. La leganto eble povas senti la sunon brilantan sur stano nukon dum la cikado ĉirpadas. Por la japana "cezurvorto" Miyamoto uzas strekon.

Ni do havas du partojn - la triladon de la cikado kaj la trankvilon de la naturo. Kia resonanco ekzistas inter la du partoj? La leganto denove sentas la solecon de la loko - krom la cikado oni aŭdas nenion. Sed oni eble ankaŭ sentas la plastikon de la sperto. Estas somero, kaj ĉio fartas kiel ĝi devus farti. La naturo mem ĝuas someran ferion. La leganto spertas ĉion ĉi legante nur 17 silabojn. Li kunhavas la sperton kun Baŝoo.

Mi esperas, ke ĉi tiuj kelkaj rimarkoj helpas al vi pli ĝui la hajkon. Unu fina vorto - ĉar la hajko tiel intime kunligas la verkanton kaj la leganton, estas tre facile interŝanĝi rolojn. Vi povas legi hajkon - nun provu verki unu. Prenu sperton de la natura mondo, loku ĝin en sezono, uzu du partojn por rekrei kion vi ja spertis. Baldaŭ legantoj kunhavas \*viajn\* spertojn!

**Donald Jacob Uitvlugt**  
[South Bend, Usono]

### Vintraj impresoj


Ekster la domo  
infanoj ĝoje sledas;  
neĝa aromo.



Ŝtormegas blanke;  
kun gefiloj ludluktas  
paĉjo surplanke.



Varmĉokolado  
el termoso vaporas;  
glacifiŝado.



**Ives Brusq** [Douarnenez, Francio]

Kio estas hajko?  
Ĉu la inversa florbildo  
en la klara akvo de l' lageto?



Neĝo sur la ter'.  
En la senfolia arb'  
silentas la bird'.



Skuita mia pord'  
de l' freneza vintra vent'.  
"Kiel bone ĉe la fajr'.



Lun', amikino mia!  
vartu miajn sekretojn,  
disigitajn de la vent'.



Fulgomakuloj  
sur tute blanka tuko!  
Korvoj sur neĝo.



Kiel longa la tempo  
kaj kurta la vivo!  
Kiu diros kial?



Sorĉega nokto!  
La steloj palpebrumas  
unu al la alia.



Nenia inspiriĝo.  
"Muzo! nur unu hajkon!"-  
Tuj kantas la grilo.



Glacieroj ĉe l' bordoj  
de l' frostita lageto.  
"Ĉu frostas fiŝoj?"



Mi estas senpenŝa;  
eĉ ne unu verso.  
Helpon, Muzo!



Jose Roberto Tenorjo [Rio de Janeiro,  
Brazilo]

## Monosilaboj

Dank'al la rimedo elpensita de la kreinto de Esperanto por forigo de la lasta vokalo ĉe substantivoj, la lingvo tiras la atenton de poezi-amantoj al interesa formo de poemo, nome monosilabo. Se tamen ĝi riskas ne plaĉi kiel beletraĵo, oni provu eluzi tiun ĉi rimedon ĉe instruado de la lingvo. Per ekzercado de tia poemo, krom ekvidi pli klare la strukturon de la radikaro esperanta, la gelemantoj praktikos la bonan uzadon de prepozicioj. Jen estas specimenoj de monosilabaj frazoj:

Jen solv'	Riĉ'	Nutr'	Ĝoj'
por cel'	kun	de	de
trud'	nur	saĝ':	fil'
de al	de	serĉ'	ĉe
pov':	ĝu'	de	dorm':
lern'	jen	kon'	kis'
de l'	pord'	el	de
lingv'	al	hom'	patr'
de fal'	sen	post	post
pac'	de	pigr'	leg'
nun.	de	al	de
	hom'.	lem'.	libr'.

Plej'	Bel'	Leg'	Hav'
de de	de	de	de
bon'	am':	libr':	pens'
sur vir'	voj'	sen	sen
ter':	kaj al	tim'	tim'
ag'	in'	sci'	pri l'
de ĉe	ĝu'	nov':	nov':
help'	kuŝ'	saĝ'	romp'
al por	kaj	de	de
frat'	nask'	pov'	kaĝ'
sen de	sen	de l'	de l'
cel'.	beb'.	lim'.	mens'

Jen solv' por trud' de pov': lern' de l'  
lingv' de pac' nun.

Riĉ' kun cel' nur al ĝu' jen pord' al fal'  
de hom'.

...

Ĝoj' de fil' ĉe dorm': kis' de patr' post  
leg' de libr'.

Hav' de pens' sen tim' pri l' nov':  
romp' de kaĝ' de l' mens'.

Sylla Chaves [Brazilio, Barzilo]

*Antaŭ vi estas belega poemo de Eŭgeno Mihalski:  
"Paraleloj". Li ĝin verkis la 15-an de aŭgusto 1918.*

*Antaŭ la apero de la esperantaj verkistoj, kiuj malamas la prefikson "MAL.", kaj tial klopodas enkonduki en Esperanton plurajn dekojn da neologismoj por ilin anstataŭi, Mihalski pruvis, ke Esperanto ne bezonas tiun danĝeran lavangon da neologismoj, ĉar la klasika Esperanto jam havas multajn rimedojn por ke tiu prefikso aperu en niaj verkoj ŝpare kaj bele. Sufiĉas, ke la verkisto respektu la lingvon de Zamenhof kaj havu talenton por jongli per siaj vortoj, kiel faris Mihalski.*

Adoro - malamo,  
promeso - jurtempo,  
trankvilo - ekflamo,  
fidelo - fi-trompo.

Eŭgeno Mihalski

## Paraleloj

Novo - malnovo,  
eterno - momento,  
potenco - senpovo,  
feliĉo - turmento.

Edeno - infero,  
kompato - kruelo,  
beato - sufero,  
mildeco - ribelo.

Revado - konfeso,  
timemo - arogo,  
memoro - forgeso,  
vereco - mensogo.

Amemo - pasio,  
hontemo - senĝeno,  
tuteco - nenio,  
libero - kateno.

Kareso - insulto,  
konfido - jaluzo,  
konstanto - adulto,  
sincero - amuzo.

Trotakso - banalo,  
diigo - profano,  
vizio - realo,  
anĝelo - satano.

Modero - senbrido,  
tolero - postulo,  
kolombo - aspido,  
sindono - spekulio.

Naturo - komerco,  
pureco - malĉasto,  
malsperto - ekzerco,  
similo - kontrasto.

Ekflugo kaj falo,  
heroo kaj vermo,  
espero - fatalo,  
naskiĝo - ekstermo.

Jen estas varioj  
de l' amo -  
burlesko  
kaj dramo!

1918





## LINGVAJ RESPONDOJ L. L. Zamenhof

## Rilataj pronomoj

## Kiu, tiu, kia tia

La diferenco inter *kiu*, *tiu*, k.c. kaj *kia*, *tia* k.c. estas sekvanta: la formoj kun *u* estas puraj pronomoj kaj la formoj kun *a* estas pronomaj adjektivoj signifantaj econ. *Kia* = *kian* econ havanta k.c. Al la vorto *kiu* vi povas respondi per substantivo, dum al la vorto *kia* vi devas respondi per adjektivo. Ekzemple: je la demando “*kiu domo*” vi respondas: *tiu domo*, *tiu ĉi domo*, *la domo de la parto*, k.c.; sed je la demando “*kia domo*” vi respondas: *tia domo*, *tia domo kiel mia*, *alta domo*, *longa domo*, *bela domo* k.c.

*La Esperantisto*, 1891. p.15

## Nedifinitaj pronomoj

Pri “*ioj*”, “*tioj*”, “*kioj*”

Teorie la ĵus diritaj formoj tute bone povas havi multenombro tiel same, kiel ili havas akuzativon; sed en la *praktiko* mi ne konsilas al vi uzi la diritajn vortojn en multenombro, ĉar laŭ mia opinio ilia *senco* tion ĉi ne permesas.

“*Tio*” prezentas ja ne ian difinitan objekton, sed ian *bildon* (aŭ abstraktan ideon), kaj bildo restas ĉiam ununombra sendepende de *tio*, ĉu ĝi konsistas el unu objekto aŭ el multaj.


Tamen se aperas ia tre malofta okazo, kiam la logiko postulas, ke ni uzu la diritajn vortojn en multenombro, tiam la *gramatiko* de nia lingvo tion ĉi ne malpermesas. Ekzemple: “*Lia potenco konsistas el diversaj ioj*, el *kiu ĉiu* aparte per si mem estas ne grava, sed ĉiuj kune donas al li grandan forton”.

respondo 18, *La Revuo*, 1907, Junio

Pri la *senco* de “*Certa*”

Krom sia ĉefa *senco*, la vorto “*certa*” havas ankoraŭ la *senco* de “*iu*” (ne en la *senco* de “*kiu ajn*”, sed en la *senco* de “*iu difinita*”); la uzado de “*certa*” en la *senco* de “*iu*” tute ne estas franclingvaĵo, ĉar tiel same oni uzas tiun vorton en la lingvoj germana, rusa, pola kaj aliaj.

Respondo 57, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p.223

Pri la formo “*Ĉio ĉi*”

Anstataŭ “*ĉio tio ĉi*” vi povas tre bone diri “*Ĉio ĉi*”, ĉar la vorto “*ĉi*” jam per si mem signifas proksiman montron.

*La Esperantisto*, 1889, p.15

Pri la vortoj kun “*ĉi*”

Ni havas egalan rajton uzi la “*ĉi*” *antaŭ* aŭ *post* la pronomo (aŭ adverbo); sed ĉar la “*ĉi*” estas tiel forte ligita kun sia pronomo, ke ili ambaŭ prezentas kvazaŭ unu vorton, kaj ĉar tiu kvazaŭ-unu-vorto per la loko de sia akcento faras impreson de neharmonia escepto inter ĉiuj vortoj de Esperanto, tial pro belsonco ordinare estas preferinde starigi “*ĉi*” *antaŭ* la montra vorto. La uzado de streketo inter la montra vorto kaj “*ĉi*” (t.e. skribado “*tiu-ĉi*” aŭ “*ĉi-tiu*” anstataŭ “*tiu ĉi*” aŭ “*ĉi tiu*”) ŝajnas al mi nur simpla erara kutimo, kiun nenio pravigas


Respondo 52, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p.2

Siajn impresojn, en ĝenro de raporto, pri la unua vizito al Japanio kaj renkontiĝoj kun japanaj esperantistoj, sendis al la redakcio

**Holikberdi Kozimov**, [Samarkando, Uzbekio]

Estas interese, ke la bildon, kiel kontribuojn al "K", s-ino **Osioka Taeko** sendis al ni antaŭ unu jaro kaj ĝi kuŝis en nia "teko", kvazaŭ atendante tiun momenton.

## Mia unua vojaĝo en Japanio



**M**i venis al Japanio en grupo de tri delegitoj de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro el Samarkando (Uzbekio) por partopreni la Mondan konferencon kontraŭ Atom- kaj Hidrogen bomboj.

Alfluginte al Kansaja flughaveno, ni tuj ekveturis al Kioto, kie nin renkontis s-ino Aiko Watanabe, kiu same kiel ni estas membro de "Servas" - hejmgastiga popaca organizo. S-ino Watanabe proponis al ni viziti la grandan budhisman templon "Higasi Honganĝi", kie ni vidis valorajn historiajn memoraĵojn kaj ekspozicion laŭ motivoj de ŝia libro "Fabeloj el budhisma literaturo". Tiu ĉi bela ekspozicio longe restos en nia memoro! Aiko-san donacis al nia grupeto du siajn librojn – en Esperanto kaj en la angla lingvo kaj invitis nin en sian domon en urbo Otsu, kie ŝi kaj ŝia edzo Akinobu-san bonkore gastigis nin kaj regalis per bongustaj japanaj manĝaĵoj. Kune kun Aiko-san ni ankaŭ vizitis tre belan botanikan ĝardenon en urbo Kusatsu ĉe la lago Biwa. Tie ni ĝuis naturan lotusan plantejon kaj multajn belegajn florojn. La sekvan tagon frumatene ni vizitis la art-galerion Sirakawa kaj tage forveturis per trajno al Hiroŝima.

Alveninte al Hiroŝima, ni ekloĝis en la hotelo. Solena malfermo de la konferenco okazis la 2-an de aŭgusto. Dum kelkaj tagoj la kunvenintoj el multaj landoj prelegis kaj pridiskutis la aktualajn problemojn de

neniigo de nukleaj armiloj en la mondo. Dum la konferenco estis subskribita kontrakto pri kunlaboro inter la Internacia Muzeo de Paco en Samarkando kaj la Muzeo por Monda Paco ĉe la Universitato Ritsumeikan en Kioto. La 6-an de aŭgusto en la urba Parko de Paco okazis la ceremonio de omaĝo al pereintaj atombombitoj, en kiu ĉeestis 10000 da japanoj kaj eksterlandanoj. Nin tre impresis ankaŭ vespera evento, kiam ĉe la rivero kunvenis multaj loĝantoj kaj gastoj de Hiroŝima kaj naĝigis memorlantemojn kun brulantaj kandeloj, tradicie rememorante la forpasintojn. En la Parko de Paco ni partoprenis ankaŭ la Pacpreĝan ceremonion, kiun organizis japanaj aktivuloj el Monda Pacpreĝa Societo kaj Goi Paca Fondajo. Sonis alvokoj por paco en ĉiuj landoj de la terglobo. Vespere nin invitis vespemanĝi lokaj membroj de la Societo Japanio – Eŭrazio. Nia renkontiĝo kun ili pasis en tre amikeca etoso.

En Hiroŝima ni renkontiĝis ankaŭ kun Esperanto-amikoj Montaka kaj Taeko Osioka. Interalie, Taeko volontule gvidis japanlingve ekskurson tra la urbo en malnova tramo por japanaj delegitoj. Geedzoj Osioka invitis nin al sia Esperanto-Domo por tagmanĝi. En ilia hejmo ni bonege pasigis la tempon, konversaciante je diversaj temoj. Posttagmeze kune kun s-ro Osioka ni vizitis la japanan banejon kaj urban monteton, de sur kiu ni vidis vastan kaj belan panoramon de la urbo.

S-ro Osioka transdonis al ni kelkajn ekzemplerojn de la ĵus eldonita japanlingva E-broŝuro "Invito al Internacia Lingvo Esperanto". Dum sekvaj tagoj tiu ĉi belaspekta libreto multe helpis al ni komuniĝi kun la japanoj kaj popularigi Esperanton inter diverslandaj partoprenantoj de la konferenco. Pluraj personoj, precipe el Japanio, Koreio kaj Kazahio, interesiĝis kaj ekvolis studi la Internacian lingvon. En tiu ĉi forumo ni estis solaj esperantistoj ĝis la momento kiam ni tute hazarde malkovris ankoraŭ unu esperantistinon s-inon Suwako Nagata el Kobe, kiu iniciatis kaj koordinas interesan pacprojekton "NEGAJ" ("Nia Deziro" – samtitola kanto estas tradukita ankaŭ en Esperanton).

Ankoraŭ du tagojn ni gastis en urbo Ono en la hejmo de s-ino Hiromi Ikeda, kies filino organizis por ni interesan ekskurson al la apuda fama insulo Mijaĝima. S-ino Ikeda ege surprizis nin, kiam ŝi transdonis al ni la japanan tagjurnalon "Akhata" kun pluraj artikoloj pri la konferenco kaj eĉ montris al mi mian foton en tiu ĉi periodaĵo.

Al Nagasaki ni kaj ĉiuj aliaj delegitoj veturis per trajno Nozomi. En Nagasaki ni vizitis la urban Muzeon de Paco, partoprenis surstratan kampanjon pri kolektado de subskriboj por senprokrasta malpermeso de la nukleaj armiloj.

Post la konferenco ni revenis al Kioto, kie nin denove renkontis s-ino Aiko Watanabe kaj akompanis al artgalerio de Fumiko Nakajama. Poste ni gastis ĉe esperantista familio Tahira. S-ino Tahira diris al ni, ke ŝia domo estas malgranda, sed ni respondis, ke tio tute ne gravas: por ni gravas, ke estas "grandaj" la koroj de Masako kaj Minoru Tahira. Malfacilas vorte priskribi ilian gasteman prizorgon. Ili organizis por ni tre agrablajn ekskursojn en Kioto, Osako, Naro kaj Kobe, kiuj lasis ĉe ni neforgeseblajn impresojn. Kiam mi estis en Nara parko, en Todajĝi-Templo kaj Kasuga sanktejo mi ĝojis kaj admiris, kiom zorge en Japanio oni konservas historiajn monumentojn por estontaj generacioj. En japana ĉiutaga vivo mi trovis multajn similajn kaj konatajn al ni en Uzbekio kutimojn kaj tradiciojn. Mi mem esperas baldaŭ reveni al Japanio por partopreni la 91-an JEK en Inujama kaj havos eblon daŭrigi mian konatiĝon kun Japanio kaj japana vivo. Ĝis la revido!

la bildon sendis al "K" Osioka Tajeko [Hiroŝima, Japanio]

*Jen estas interesaj popular-sciencaj informoj kiujn esperantigis kaj sendis por nia rubriko "Ĉu vi scias, ke" Dorothea Kaiser, [Altenburg, Germanio]*

Jutta Junge

## Sane tra aŭtuno kaj vintro

Pro kio pomoj estas pli preferindaj ol kivitaj, kaj kial jogurto protektas kontraŭ nazkataro? - Esploristoj ekzamenis, kio okazas en organismo de homo dum la ŝanĝo de somero al aŭtuno. Rezulte aperis listo de la protektiloj, kiuj malpliigas la riskon de malvarmumo.

"Ĉu vi havas pli ol du gripajn infektojn dum jaro?" - per tiu anonco la universitato de Manĉestro serĉis libervolajn testpersonojn. La celo estis: eltrovi, kio fortigas kaj malfortigas la imunsistemon rilate al malvarmumaj malsanoj. Ĉe tio la esploristoj faris en ampleksaj testserioj jenan malkovron: antaŭ ĉio personoj, kies intestaro estis ĝenata, havis ankaŭ malbonajn imunsistemajn indikojn kaj pli ofte malsaniĝis je malvarmumo. "Tio, kion ni manĝas, fakte decidas, ĉu nia imunsistemo funkcias kontraŭ virusoj kaj bakterioj, aŭ ne", - klarigas profesoro James Mangold.

Nia intestaro kun siaj tridek kvadrataj metroj aree estas nia plej granda korpa organo. Ĉi tie estas la trejnada loko por nia protekto kontraŭ malsanoj. Ĉi tie - kaj ne en la spirvojoj - okazas la unua decida batalo kontraŭ malsanigiloj. La digesta sistemo ludas gravan rolon ĉe la formado de imunĉeloj kaj havigas al la imunsistemo la nutraĵerojn, necesajn por la konstruo de protektaj ĉelaj armeoj. Sed ĝuste en aŭtuno kaj vintro multaj homoj emas al nutraĵoj, kiuj estas grasigaj kaj dolĉaj. Tio kreas stimulan klimaton por bakterioj en la korpo kaj malfortigas la iunistemon. Pli da graso en la sango, ol oni bezonas, estas danĝera, ĉar grasĉeloj baras la imunsistemon en la organismo. Kolbaso aŭ steko malfortigas la imunforton de la intestaro dum kelkaj horoj. Homoj, kiuj ĉiutage manĝas viandon, reduktas la kapablecon de normala funkciado de la intestaro. Tial oni rekomendas ne pli ofte ol dufoje dum semajno manĝi viandon kaj anstataŭ grasaj kolbasoj preferindas

manĝi magran ŝinkon aŭ salamon el kokinaĵo.

La biokemiisto d-ro E. Farmer (Universitato de Kalifornio) sukcesis pruvi, ke ankaŭ konsumado de sukero efektive malpliigas la imunforton. La glukozo, kiu torentas en la sangon, algluiĝas je la receptoroj de la imunkorpoj kaj forpuŝas de ili substancojn, bezonatajn por la forto de imunsistemo, ekzemple vitaminon "C". Plejbone estus rifuzi de suker-uzo, sed tio apenaŭ realigeblas. Sencohava metodo estas rifuzo de dolĉaj trinkaĵoj, "Coca-Cola" ktp kaj anstataŭ sukeron prefere uzi mielon aŭ siropon.

Se daŭrigi la liston de imundetrantoj, necesas mencii pri antibiotikoj, kiuj ankaŭ signife malfortigas la imunsistemon. Sendube, ĉe gravaj bakteriaj infektoj antibiotikoj povas esti savoj, sed ili havas gravajn apudefikojn. Unu el ili: ili detruas la imunsuŭtenantajn intestbakteriojn, tial kuracistoj rekomendas paralele kun antibiotikoj uzi preparaĵojn, kiuj kondukas al rapida rekreado de intestbakterioj.

Al la sama listo oni povas aldoni rolon de aero en ĉambro: jam 24-hora restado en la ĉambro malpliigas la protekto kapablon de imunĉeloj de la mukozoj je 30%. Kontraŭrimedo: ĉiutage unu horon labori en ĝardeno aŭ promeni. Frideta kaj malseka aero refunkciigas hejtile damaĝitajn mukozojn dum 50-60 minutoj.

Esploristoj rekomendas ankaŭ eviti pezan cerbumadon. D-ro Rihard Davidson (Universitato en Wisconsin-Madison) pruvis, ke mensaj procezoj influas nian korpan sanecon. Ju pli optimisme ni pensas (agado de maldekstra cerboduono) - des pli bone nia imunsistemo estas refunkciigata kaj pli da protektoĉeloj produktas nia organismo.

Plej bona vojo, kiu helpas protekti nian imunsistemon, estas taŭga nutrado. Nutraĵesploristoj apartigis plej gravajn nutraĵojn, kiuj optime subtenas nian imunsistemon kaj faras nin rezistaj kontraŭ aŭtuno-kaj vintromalvarmumo.

### Fortigiloj por la imunsistemo:

- Ŝampinjonoj entenas elementon (beta-glukanon), kiu pliigas reakcion de la fagocitoj (imunaj manĝegĉeloj) je 300%. Do, estas rekomendita - unufoje dum semajno manĝi ŝampinjonojn, plej bone en salato.

- Tomatosupo kun timiano imunfortigas kaj efikas eĉ duoble:


elemento licopino pliigas la formadon de imunĉeloj en la korpo, kaj freŝa timiano estas altvalora natura kontraŭbakteriaĵo. Estas rekomendita manĝi tomatosupon kun timiano, se oni eksentis la unuajn simptomojn de malvarmumo.

- Fiŝo entenas ĉiujn konstrumaterialojn por imunsistemo: proteinojn, vitaminojn "A", "C", "E" kaj la mineralojn zinko kaj seleno. Fiŝmanĝantoj malpliofte malsaniĝas je malvarmumo - tion pruvis la imunesploristo d-ro Eutachi, kiu rekomendas de oktobro ĝis aprilo dufoje dum semajno manĝi fiŝojn

- "Unu pomo estas pli bona ol dek kivitaj", - asertas imunesploristoj. Pomoj estas la plej bonaj liverantoj de vitamino "C" por aŭtuno kaj vintro. Kvankam kivitaj kaj aranĝoj entenas multe pli da vitamino "C" ol pomoj, sed la tiel nomata biologia disponigebeco ĉe pomoj estas 10-foje pli alta, ĉar la pomoj havas substancojn, kiuj plifaciligas al la organismo akceptadon kaj uzadon de vitamino "C".

- Avenflokaj kreskigas la imunajn mortig-ĉelojn. Usonaj sciencistoj malkovris en la aveno substancan MGN3, kiu estas evidente la ŝlosilo por la formado de mortigaj imunaj ĉeloj. Oni rekomendas manĝi avenon matene (ekzemple en muslio), tio fortigas la imunsistemon por la tuta tago.

- Zingibro plirapidigas la imuncirkuladon. Aŭtune aŭ vintre ofte la metabolo laciĝas, kiel sekvo - malpli da imunĉeloj cirkulas tra la korpo. Tial la bonŝancoj de malvarmumo kreskas. La plej efika kontraŭrimedo estas zingibro. Ĝi aktivigas la metabolon je 30%. Ĝuste tiam, kiam oni frostotremas, kaj sentas la unuajn simptomojn de malvarmumiĝo, oni uzu zingibron en teo aŭ puran (ambaŭ haveblas en specialaj magazenoj).



*Fortan sanon deziras  
al vi Donjo!*

## Neelpensitaj historioj

*Ni pensas, ke tiun ĉi humuran rakonton, kiun verkis nia neforgesebla Bill Thorne, kaj kiu kuŝis en la redakcia arkivo, ni rajtas trakti kiel "neelpensitan historion", ĉar la aŭtoro plej ofte priskribis realajn okazintaĵojn el propra vivo.*

Bill Thorne

### Do, mi lernu Esperanton por trafi en Esperantujon!

Foje en iu ĵurnalo mi trovis sarkasman leteron de iu usonano kontraŭ Esperanto, en kiu la aŭtoro skribis: "Ĉar la usona lingvo estas taŭga por nia Sinjoro Jesuo Kristo, ĝi estas plej taŭga por ĉiuj".

Mi ĉiam kritike rilatas al ĉio, kion mi legas, speciale al reklamoj. Tial mi pensis, ke evidente Esperanto estas bona ideo, ĉar oni ĝin kritikis. Mi elfosis la artikolon, kontraŭ kiu leterumis la usonano kaj tie mi trovis priskribon de Esperanto, dudekon da esperantaj vortoj kaj adreson de la loka klubo. "Sendube la klubanoj devas ekĝoji pro tio, ke mi venos al la klubo" – pensis mi kaj decidis viziti ĝin.

Ĉe la kluba pordo min afable renkontis kaj bonvenigis iu ulo.

— Kiel vi fartas? – demandis li.


Mi ridegis, ĉar "fart" estas tre, tre kruda angla vorto, kiu signifas "furzi". Ha, ha, ha!

— Ho, jes, mi fartas bone, - mi respondis lerte, laŭ mia vortolisto el la ĵurnalo. Mi jam sentis min spertulo!

Li rigardis min serioze, supre de la okulvitroj. Evidente mi imponis lin. Kviete li diris: "Bonvolu enveni" kaj indikis la vojon. Evidentiĝis, ke hodiaŭ en la klubo estis planita montrado de lumbildoj. Mi rigardis ĉirkaŭ mi, serĉante per okuloj iun simpatian inon por amikiĝi. H...m... Dume oni prezentis la prelegonton, kiu estis virino samaĝa kiel mi.

Komenciĝis la programo de lumbildoj. Mi tute ne komprenis, kion rakontis la sinjorino, sed la bildoj rakontis per si mem. Ŝi rakontis per tiuj bildoj pri sia vojaĝo, kiu estis evidente interesa por la ĉeestantoj. La fotoj estis amatoraj; sur la unua aperis renversita aeroplano; sur la sekva estis hotelo, fotita diagonale, ĉar alie ĝi ne enkadrigis plene. Poste aperis floroj en parko, fotitaj nefokuse, grupo de homoj sur placo tre malproksime, mangajaĵoj sur tablo - denove nefokuse. Azeno kun flankkorboj...

Kelkfoje mi kaptis en ŝia rakonto vortojn similajn al la niaj. Do, mi povis konjekti pri kio temis. Intertempe mia nova amiko, kiu renkontis min ĉe la pordo, flustris al mi tradukon: la sinjorino vojaĝis kun du amikinoj al Universala Kongreso de Esperanto.



Bill Thorne

Ŝi rakontis pri tio, ke kiam ili atingis Grekion, ili frontis problemojn pri portado de valizoj, paltoj, ombreloj, fotiloj, sakoj kaj ceteraj objektoj. Finfine ili enloĝiĝis en la hotelon kaj eliris por serĉi la kongresejon. Ili vagis tra la stratoj, eĉ demandis la policiston, kiu nek komprenis ilin, nek volis helpi.

Baldaŭ ili renkontis alian grupon da homoj, kiuj ankaŭ havis palajn vizaĝojn kaj kiuj evidente ankaŭ estis alilandanoj kaj esperantistoj. Ambaŭ grupoj renkontiĝis, konatiĝis kaj post komuna fotiĝo sur la placo iris kune al la granda konstruaĵo, kiu surhavis grandegan verdan standardon kun verda stelo, pendigita tamen tro alte, kaj tial la kongresejo estis preterpasita.

La virino komentis la bild-filmon plu. Neniu memoris, kompreneble, temojn de la kongresaj kunsidoj kaj prelegoj. Tamen bone memorfiksitis la bankedon por pli ol ducent ĉeestantoj, kiu okazis en la granda salono. La demandoj ĉe la tabloj estis primitivaj, kvazaŭ dum lecionoj de elementa kurso: "El kiu lando vi venis?", "Kiun laboron vi havas?", "Vidu fotojn de miaj infanoj", "Ĉu vi konas Pol Dupone?" "Jes, li dikiĝis kaj daŭre ludas violonon." – "Ĉu vere?"

Subite mia cinika kaj skeptika rilato al la situacio ŝanĝiĝis. Mi ankaŭ ekvolis vojaĝi kaj perdiĝi en strangaj urboj... Mi ekvolis fari malbonajn fotojn. Mi ekvolis adori varman sunon. Mi ekvolis esti en tiu stranga familio kaj iĝi *amiko*, vivi per iliaj problemoj, per ilia vivmaniero. Mi ekvolis interŝanĝi leterojn kun tiuj amikoj, kies vizaĝoj restos en mia memoro....

Tamen por fari tion mi unue bezonus lerni la lingvon. Kian lingvon? Ĉu la grekan, germanan aŭ la polan? Aŭ la araban kaj poste la ĉinan? Ne, dankon, mi ne kapblas. Aŭ mi devigu la tutan mondon ellerni la mian, plej facilan por mi, ĉar mi jam konas ĝin?! Ne eblas. Eĉ la sinjorino, kiu prelegis, ne parolas la mian - tion mi konstatis, invitinte ŝin al mia hejmo.

Feliĉe jam estas kreita la internacia lingvo kaj "ĝi sufiĉas por ekzisto". Do, mi lernu Esperanton por trafi en Esperantujon!



kolektis kaj esperantigis **Sevĉenko Katja**  
[Aktaŝ, Rusio]

## Tiu freneza mondo

Parolas du frenezuloj:

- Mi libron decidis verki.
- Kial?
- Ĉar mankas al mi kion legi.

\*

Parolas du frenezuloj:

- Mi tre ŝatas ricevi leterojn. Tial mi skribas ilin al mi mem., kaj mi jam ricevis unu el ili.
- Kaj kio estas skribita en ĝi?
- Mi ne scias, mi dume ne legis.

\*

Edzo al la edzino:

- Mi estis freneza kiam mi edziĝis al vi!
- Jes, mi scias. Sed ĉar mi estis enamiĝinta tiam, mi ne rimarkis...

\*

Telefonvoko al frenezulejo:

- Rapide venu! Mia edzo frenezigiĝis, li prezentas sin helikoptero! Li trinkis vazon da benzino, kaj nun li cirkle kuras en la ĝardeno kaj penas ekflugi!
- Trankviliĝu kaj nur kontrolu, ke li ne forkuru el la ĝardeno. La benzino baldaŭ finiĝos.

\*

Viro kun terura vizaĝo enkuris en kuracistan oficejon, kaj diras:

- Sinjoro kuracisto, estas terurege! Ĉiufoje kiam mi diras la vorton "Abrakadabro", ĉiuj malaperas! - Sinjoro kuracisto, kien vi foriris...?

- En psikiatria kliniko flegisto vidas frenezulon, kiu alkroĉiĝis al lustro. Li demandas la alian frenezulon:
- Kial tiu alkroĉiĝis al la lustro?
  - Li pensas, ke li estas lampo.
  - Helpu min demeti lin for de la lustro..
  - Ne! Ni restos sen lumo.

Kolektis kaj esperantigis **Kolodin Aleksandr** [Bajkalsk, Rusio]

## Fiŝo scias pri naĝo ankaŭ sen via saĝo

(L. Zamenhof)

Renkontiĝis du fiŝkaptistoj kaj interparolas.

- Kial vi ne iris al fiŝkaptado ĉi-semajnfine?
- Ĉar mi legis en la horoskopo, ke estas bonŝanca tago por Fiŝoj.

\*

Parolas du fiŝkaptistoj:

- Antaŭ kelkaj tagoj mi kaptis fiŝon, kiu havis flugilojn, - rakontas la unua.
- Sed mi antaŭnelonge kaptis per mia fiŝkaptilo televidilon, kiu funkcias... - respondas la dua fiŝkaptisto.
- Aŭskultu, - parolas la unua fiŝkaptisto, - se mi forigos de mia fiŝo la flugilojn, ĉu ĉesos funkcii via televidilo?

Fiŝkaptisto al sia edzino:

- Kara mia, rigardu, kiom da fiŝoj mi hodiaŭ kaptis!
- La najbarino vidis, ke vi eniris la fiŝan vendejon.
- Certe, la fiŝoj estis tiom multaj, ke mi estis devigita vendi la parton de ili!

\*


Fiŝkaptisto al aborigeno:

- Bonvolu diri, ĉu en tiu ĉi lago eblas kapti fiŝojn?
- Neniu malpermesas fari tion
- Ĉu eĉ permesblas kapti fiŝojn per reta fiŝkaptilo?
- Bonvolu kapti.
- Do, se mi kaptos fiŝeton, tio ne estos kontraŭleĝa afero?
- Ne, tio estos miraklo!

\*

Estas belega tago. Sur la bordo de rivereto staras fiŝkaptisto kaj penas kapti fiŝojn. Alproksimiĝas lin alia homo kaj demandas:

- Kia estas la akvo hodiaŭ?
- Tre bona. La fiŝoj eĉ ne volas eliri el ĝi.



Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]

## Gaja ludo por ripozo

**Martin Ginette** [Saulxures/Moselotte, Francio]

### Dum plenumado de tasko, oni perdas sian lokon

*En tiu ludo povas ludi de 30 ĝis 70 personoj, ĉar la spektantoj estas aktivaj.*

La ludo-organizanto elektas 12 virojn, aŭ 12 virinojn (aŭ la volontuloj proponas sin). Ili sidigas sur 12 seĝojn; ili devas esti je ioma distanco for de la aliaj partoprenantoj (la spektantoj).

La ludo-organizanto anoncas unu taskon al la 12 sidantoj. Ekzemple: "Vi devas trovi unu alumeton kaj reveni kun ĝi"

De tiu momento la 12 ĉefaj ludantoj devas rapidi al la spektantoj kaj trovi alumeton kiel eble plej rapide. La spektantoj vigle helpas, etendante la manojn kun alumetoj, se ili posedas ilin. La ludantoj kuras, sed kiam ili revenas, ĉiu kun la alumeto enmane, unu seĝo okazas forigita, ĉar la lud-organizanto forprenis ĝin. Tiu ludanto kiu venas la lasta, okazas sen seĝo kaj ne plu povas ludi, sed antaŭ la reveno al la spektantoj li/ŝi ricevas "punon".

Pri la "punoj": ili povas esti amuzaj kaj prenitaj hazarde (antaŭe skribitaj sur kartoj kun kaŝita flanko).


La puno povas ankaŭ esti: "Diru kelkajn vortojn en Esperanto"

Pri la ludo mem:

La serĉotaj objektoj povas esti tre diversaj: verdaj steloj, juveloj, stir-permesoj, moneroj. Ili ankaŭ povas esti troveblaj ekstere, ekzemple: "Revenu kun ŝtoneto".

La ludo estas tre amuza ĉar la konkurantoj multe kuras kaj agitiĝas. Aliflanke la spektantoj elturniĝas por helpi al la ludantoj, ankaŭ multe vigliĝas. La kvieto revenas post ĉiu «serĉado» kaj dum la plenumado de la "puno" far la seĝoperdanto.

Tiu ludo estas bazita sur movo kaj elturniĝemo. Tamen oni devas bone aŭskulti kaj kompreni la taskojn se oni volas gajni. Do oni devas esti tre atentema en aŭskultado.



Esperantigis  
**Viktor Derjavin** [Aŝa, Rusio]

## Ŝerca terminaro

### Avareco

ple bona rimedo kontraŭ virinoj.

### Babilulo

trovaĵo por kompanio de portebblaj telefonoj.

### Bonŝanco

rezulto de tre diligenta preparado.

### Ĉio

kiam sub la portreto jam aperis la dua dato.

### Dieto

plibonigas apetiton.

### Momento

mezurunuo de feliĉo.

### Plena nulo

aspektas pli impone, ol magra 1.

### Ruzeco

estas saĝeco de stultuloj.

### Sperto

tio, kion vi ricevas, ne ricevinte tion, kion vi volis.

### Sukero

alportas malagrablan guston al kafo, se ĝin tien ne meti.

### Viruso

ne speco de vivo, sed speco de morto.

**Ni gratulas:** **Beatrice Jouault**, [Landivisiau, Francio], **Jackie Huberdeau** [Le Mans, Francio],

**Loŝmanov Anton** [Komsomolsk-na-Amure, Rusio], **Jean-Luc Tortel** [Paris, Francio], kiuj korekte solvis la enigmojn el antaŭaj "Ripozejoj"

Solvoj de la taskoj el la "Ripozejo" de "K"-4-2004

**Krucenigmo "Bumerango"**

1.abelo 2.obuso 3.kromo 4.onklo 5.kropo 6.makul(o) 7.framb(o) 8.kreto 9.trono 10.blato 11.ocean(o) 12.plago

**Enigmo "Tri fratoj":** Aleksej – Irkutsk – kemio // Segej – Moskvo – biologio // Viktor – Novosibirsko – Historio



*Karaj amikoj! Hodiaŭ en la rubriko "La Praktiko" ni konatigas vin kun la biciklistoj-esperantistoj. Ĉi-tiu organizaĵo estas unu el tiuj, kiuj vere praktikas nian lingvon sur sia kampo. Ĉi-sube vi trovos la bazajn informojn pri BEMIM kaj povos legi akordan al la temo versaĵon, ankaŭ pri la bicikloj.*

## BEMIM

estas la Biciklista Esperanto-Movado Internacia, faka sekcio de TEJO: grupo de esperantistoj, kiuj biciklas iomete pli ofte kaj serioze ol averaĝe.

Celoj de BEMIM estas: diskonigi Esperanton inter biciklantoj kaj biciklemon inter esperantistoj, aranĝi internaciajn biciklo-karavanojn, servi kiel helpilo por sole vojaĝantaj biciklistoj.

Praktike BEMIM provas aranĝi almenaŭ unu internacian biciklo-karavanon ĉiujare. Ĝi ankaŭ servas kiel kontaktilo por tiuj biciklistaj esperantistoj, kiuj preferas vojaĝi sole. La BEMIM-anoj kunsidas dufoje jare: dum la Internacia Junulara Kongreso kaj dum la Internacia Seminario de la Germana E-Junularo. Dum tiuj kunsidoj estas planataj la karavano(j).

## BEMIM-revuo

Estas organo de BEMIM, aperas 2-foje jare, celas al esperantistoj, kiuj ŝatas bicikli. La revuo ankaŭ klopodas entuziasmigi biciklantojn lerni Esperanton.

Sed ĝenerale, BEMIM organizas karavanojn al la IJK. En 2001 estis du karavanoj al Strasburgo en Francio (Norda/Suda). En 2002 okazis 3 karavanoj: al IJF en Italio, al IJK en Brazilo kaj al IBIRE en Ĉeĥio. En 2003 kelkaj homoj biciklis al IJK en Svedio.

En 2004 okazis denove pluraj karavanoj: unua al Kovrov en Rusio kaj dua en la Altaj Montaro, Siberio (tiu karavano estis nur por spertuloj).

Se vi estas unusola vojaĝema esperantista biciklanto, bonvolu rakonti pri viaj spertoj, ĉu agrablaj ĉu negativaj.

Vi povas sendi viajn rakontojn pri viaj biciklaj vojaĝoj al: <http://groups.com/group/BEMIM>

## Membrigu!

Por membriĝi en BEMIM anonciĝu ĉe *Ivo Miesen*, la sekretario. BEMIM ne kolektas membrotizojn sed volonte akceptas donacojn de mono (ekzemple al sia UEA-konto: "bemi-n"), aŭ subtenon aliforman. Pri ĉiuj demandoj kontaktu la sekretariojn:

*Ivo Miesen*, Bloemenweg 102, NL-6221-TX, Maastricht, Nederlando;

[ivo\\_m@dds.nl](mailto:ivo_m@dds.nl) ;

<http://bemi.free.fr/eo.html>

**Donjo & Cez** [Altenburg, Germanio]

## Du starantaj bicikloj

Kial staras la du bicikloj

antaŭ la taverno?

Ili staras silente kaj atendas.

Ili staras malvole

kaj sakrus,

se ili povus.

Avangardaj ili

efektive ne aspektas,

tiuj „City Bikes“ por pigruloj.

Kaj tial la bicikloj malkontentas,

ĉar ili pli volonte estus sportbicikloj.

La bicikloposedantoj ĝuste ĉiu ĝuas

grandegan salaton kun akraj kapsikoj

kaj olivoj kaj ŝafa fromaĝo.

Al tio blankan panon kaj botelon

da duonseka ruĝvino el Dornfeld.

Antaŭe ludas cigana orkestro:

„Ĉe mi vi estas bela“.

Veturmalsate

staras

la bicikloj.

# Anoncetoj

# Informoj

# Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas komencanta esperantistino dez. kor. paperpoŝte kun ĉiuj landoj kaj pri ĉiuj temoj. Respondon garantias.

*s-ino Hilda Bidoni*  
Clemente Villada 1392 -  
B° Pueyrredón  
Córdoba C.P. 5012  
**Argentino**

Mi estas 32-jara usonano, fraŭlo kaj blondharulo. Mi volas korespondi kun fraŭlinoj inter 20 kaj 30 jaraĝaj, sed ne nur. Mi parolas la anglan, la hispanan, la portugalan. Mi preferas korespondi kun junaj virinoj el Eŭropo, Latina Ameriko kaj Azio, sed estus bone havi amikecon kun ĉiuj, kiuj parolas Esperante. Miaj interesoj: rokmuziko, gitaro, fremdlingvoj.

*s-ro Blejko*  
*Hutĉinsono*  
**USA**  
tkdblake93@yahoo.com

Mi estas 10-jara lemantino kaj mi ŝatas korespondi kun ĉiuj. Int. poŝtmarkoj, vojaĝoj, k.t.p.

*Servane LE NEN*  
20 passage Jean Bart  
Landivisiau  
**Francujo**  
servanou29@aol.com

Mi estas 19-jara studento, komencanto, mi volas trovi amikojn el aliaj landoj, plibonigi mian Esperanton, interŝanĝi bildkartojn.


*Petr Adam Dohnálek*  
Opavská ul. č. 601, 742 45  
Fulnek, République tchèque  
**Ĉeĥio**

Mi estas 9-jara knabino kaj serĉas samaĝajn korespondantojn el aliaj landoj.

*Sarah Mania*  
Ĉikago  
**USA**  
sarahmania@earthlink.net

Mi estas universitata studento, dez. kor. kun personoj el diversaj landoj. Mi atendas vian respondon! Ĝis kaj Kis'!

*S-ro Lejsester Miró*  
São Paulo  
**Brazilo**  
lejsester@yahoo.com.br



Vajceva Galina [Miass, Rusio]

# KOMENCANTO 2005

restas revuo por vi,  
ne forgesu reaboni!

Mi estas 16 jara knabino. komencanta esperantistino, dez. kor. kun gejunuloj. Mi ŝatas muzikon, piediradon, literaturon.

*f-ino Mariza Monjo*  
Montrealo  
**Kanado**  
rasym7@yahoo.ca

Mi volas korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj

*Jana Penjkovskih*  
D.Bednogo, 80-41  
Makushino, 641600  
**Rusio**

Mi estas 30 jara fraŭlo, meznivela esperantisto kaj studento por la doktordiplomo en teologio. Mi ŝatus korespondantojn el Azio aŭ Orienta-Eŭropo, sed bv skribi el ajna lando! Mi preferas paper-poŝton, sed ankaŭ korespondos retpoŝte.

Int.: religioj, lingvoj kaj kulturoj, kuirado, sciencfikcia kaj fantazia literaturo, verkado.

*s-ro Donald Jacob*  
*Uitvlugt*  
836 Sorin St.,  
IN 46617  
South Bend, IN  
**USA**  
duitvlug@nd.edu

Mi estas 34-jara kanadano, komputilisto kaj artverkanto (pentrado, komponado, skribado). Mi volas ekzerci en Esperanto laŭ plej bona maniero korespondi kun aliaj samideanoj.

Int.: lingvoj, literaturo, pentrado, kampumado, monda politiko

*Erik Dessureault*  
Montreal  
**Kanado**  
camavalgrotesque@gmail.com

komencanto@r66.ru

http://Komencanto.narod.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

